

Kirikae H. skribas: 孔子 *ko:fi*, Konfuceo (551-479a.K.), instruisto de etiketo en la antikva Ĉinio, servis al la reĝo de lando 魯 *ro* kiel akceptisto. “La reĝo ordonis al li gastigon. Ĉiam, kiam gastoj estis foririntaj, li nepre raportis al la reĝo, ke gastoj reiris ne returnante la kapojn.” Daŭre de post la dinastio de 漢 *kan* (202a.K.-8p.K., 25-220p.K.) oni interpretadis, ke la gastoj estis tiom kontentaj dece gastigitaj, ke ili forgesis returni la kapojn por saluti kaj esprimi dankemon. Iu eĉ komentis, ke laŭ la antikva etiketo estis maldece por gastoj sin returni al gastigantoj adiaŭataj.

Tamen *James Legge* (1815-1897) angla ĉinologo, interpretis 不顧矣, ke “*not turning round any more.*” Ankaŭ niatempa japana orientalistoj 宮崎市定 *mijazaki ifisada* tradukis tiel, kiel sube. Kiam miaj gastoj foriras, mi akompanas ilin per okuloj starante ĉe la hejma pordo ĝis ili turniĝas ĉe la angulo de la strato kaj malaperas. La gastoj mem tempo al tempo sin returnas kaj klinas la kapojn al mi. 孔子 raportis al la reĝo: li konstatis, ke forirantaj gastoj post kelkaj sinreturnoj turnis la dorsojn al li fine kaj eksteriĝis ekster la vidon. Ŝajnas al mi, ke ĉinaj kaj japanaj konfuceanoj eraris longe (preskaŭ du mil jarojn) en la interpreto de ĉi tiu frazo.

Mi interesiĝis, ke la filozofio de 孔子 kaj liaj disĉiploj disvolviĝis pri etiketo, nome, la interrilato inter homoj, dum en Okcidento filozofio disvolviĝis pri la rilato inter homo kaj la dio. En Japanujo la etiketo estis polurita precipe en gastigado kaj altiĝis al la nivelo de belarto en te-ceremonio. En Okcidento la dio vidis homon. En Oriento homo vidis homon. Decida malsameco troviĝas inter religioj, etikoj kaj moraloj de la du civilizacioj. 𠄎

賓 ひん 不 ず 顧 かへり 矣 み
 賓 ひん 退 しりぞ 必 かならず 復 ふく 命 めい 曰 いハク
 君 きみ 招 めシテ 使 シム 擯 ひんセ
 (郷党) (中略)

賓 ひん 不 ず 顧 かへり 矣 み